# Rezolucio
# de la 77-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj
# al landaj organizoj de viddifektitoj

Ni partoprenantoj de la 77-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazinta en Olomouc - Ĉeĥio de la 14-a ĝis la 21-a de julio 2011 traktis pri jena kongresa temo:

***"Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj".***

Dum prelegoj kaj sekvanta diskutado ni konstatis, ke strebo al plibonigado de ebligo percepti kaj ĝui diversajn kulturajn aranĝojn kaj objektojn por viddifektitoj estas ĝenerala. Bonajn praktikajn ekzemplojn ni povis sperti dum ekskursoj en la kongresurbo, en ĝia urbodomo, en kelkaj muzeoj, preĝejoj kaj bestĝardeno.

Ni volas esprimi nian subtenon al ĉi tiuj klopodoj, ĉar ĉiam pligrandiĝanta nombro da menciitaj ebloj grave pliriĉigas la vivon de homoj kaj kontribuas al pli bonkvalita klerigado de gejunuloj.

Tial ni alvokas ĉiujn respondeculojn, ke spite al diversaj problemoj oni daŭrigu en ĉi tiuj streboj.